

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiam aperis la *Esperanta Antologio* dum la zamenhofa jubileo, Esperantujo subite malkovris sian poezion. Ĝis tiam estis tre malfacile fari al si ideon pri tiu grava literatura fako, kiu tiom influis nian lingvon.

A.- Tiu Antologio eniris preskaŭ ĉiujn klubajn bibliotekojn. Tio ne signifas, ke ĝi estas sisteme studata. Por multaj esperantistoj poezio restos fremda lingvo.

Cl.- Tiu Antologio gravas ne nur pro la poemoj, kiujn ĝi prezentas, sed ankaŭ per sia enkonduko kaj biografia aldono. Ĝi estas agrabla ilo por ĉiuj literatur-amantoj.

A.- Pli modeste nova antologio ludos tiun rolon. Ĝi pli allogos la vastan publikon, ĉar ĝi prezentas novelojn el plej diversaj aŭtoroj.

Cl.- Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi, du inter la hodiaŭ plej famaj esperantaj novelistoj, rikoltis 33 rakontojn. Ĉiu havos siajn personajn preferojn, kaj bedaŭros iujn ĉeestojn aŭ mankojn. Mi ekzemple ne komprenas la foreston de *Tamen perdota* de Edmond Privat, novelo kies stilo modelas en nia literaturo. Kaj *Kankro-rulaĵo* de Raymond Schwartz, novelo aperinta en *La nica literatura revuo*, ŝajnas al mi multe pli arta, ol ĉiuj, kiuj estas al ni prezentitaj en tiu verko. Ĝi verŝajne valoras novelon de la majstro Guy de Maupassant. Sed pri gusto kaj koloroj oni povus diskuti dum tagoj kaj noktoj.

A.- Ni ne volas paroli al vi pri la 33 rakontoj troviĝantaj en tiu antologio. Ni nur povas instigi vin aĉeti tiun libron. Legante tiujn tekstojn vi certe deziros koni pli pri iuj aŭtoroj. *La preĝo de M'Saud* donos certe al vi la deziron aĉeti la verkon *Vagado sub palmoj* de Jean Ribillard. Sed ni lasas vin juĝi.

Cl.- Kiel por la *Esperanta Antologio* la enkonduko de Ivo Rotkviĉ kaj la biografietoj helpas nin akiri pli ekzaktan vidon super nia propra literaturo. Bedaŭrinde la stilo de Ivo Rotkviĉ ne estas tiu de William Auld. Dum oni legis kun plezurego la enkondukon de Auld, oni cerbumas sur tiu de Rotkviĉ. Ne estas la asertoj, kiuj ŝokas, sed la vorta pezeco. Aŭskultu :

A.- « *La originalaj noveloj, kiujn paĝturne enhavas la jena antologio, prezentas interesan literaturan pontarkon super la lastaj sepdek jaroj. Kio ja estas ĉi tiu **poŝepoko** el sepdek jaroj, tiu eta parentezo de la historio, ne pli disdistanca ol unuhoma vivaĝo? Nur fingroĉerpeto el la senfunda tempujo, sed tamen plena de triumfaj leviĝoj kaj tragediaj katastrofoj de du generacioj.* »

Cl.- Ĉiu leganto havos tendencon ne kompreni tiun frazeron, se li ne relegas ĝin plurfoje kun atento :

A.- *Ne pli disdistanca ol unuhoma vivaĝo.*

Cl.- kaj tiun :

A.- *Nur fingroĉerpeto el la senfunda tempujo,*

Cl.- Vere komplika stilo. Kial **disdistanca**, kaj ne nur **distanca** ? Verŝajne multaj legantoj legos el tiu enkonduko nur kelkajn paragrafojn, kaj ili saltos al la rakontoj. Ĉu vere estas tio, kion deziris la aŭtoro de tiu enkonduko ?

A.- Ivo Rotkviĉ jam estas konata pro alia famiĝinta verko : *Tragedio en la universo*. Temis pri nura traduko, sed traduko, kiu estas epokfara verko. La aŭdaco de Ivo Rotkviĉ estis ofte

kritikita de tiuj, kiuj ŝatas retrovi en esperanto, kion ili jam konas en sia nacia lingvo. Sed multaj ŝatis la stilajn provojn.

Cl.- Kaj frazoj el tiu traduko sonoris kvazaŭ poezie. Aŭdu :

A.- *Senfinas la Universo en sia disvastigo kaj eternas en sia ekzistado.*

Cl.- En tiu alia citaĵo vi rimarkos la aŭdacon de Ivo Rotkviĉ :

A.- *La ponto al fantomas dezertece. Same dezertece ankaŭ la glacia nigreta pejzaĝo ĉirkaŭe.*

Cl.- Bedaŭrinde se tiu stilo sufiĉe fremda al niaj oreloj bone konvenis al pseŭdosciencia verko, ĝi multe tro pezas en enkonduko de antologio. Ĝi donas kvazaŭ la impreson, ke tiu verkisto nur volis paroli al fakuloj, ne volis esti aŭdata de vasta publiko. Tion oni ankoraŭ komprenus en enkonduko al poezia antologio, sed en enkonduko al simplaj rakontoj tio estas nepardonebla. Vi eble kredas, ke mi troigas. Aŭdu alian citaĵon :

A.- *Vere, la benodona kontrapunkteco kaj kelkfoja temperamenta dispolusemo de la redaktintoj perfekte sinteziĝis por la komplikita tasko.*

Cl.- Tiu stilo rememorigas al mi gimnaziajn impresojn. Dum tuta jaro mi havis profesoron, kiu ĉiam uzis la plej komplikajn frazojn por esprimi la plej simplajn ideojn. Literaturo kun li ŝajnis al ni fermita mondo. La postan jaron la impresoj estis tute alia. Pli precizema profesoro parolis al ni en la kutima lingvo. La pedanteco de la unua fermis al ni mondon. La simpleco de la dua estis kontraŭe invito ekviziti tiun mondon.

A.- Esperantujo ankaŭ posedas siajn pedantulojn. Estas eble pruvo, ke ĝi progresas !

Cl.- Jes, ni baldaŭ posedos hermetajn tekstojn, sur kiuj povos ŝviti niaj gimnazianoj. Tiu antaŭparolo de Ivo Rotkviĉ tiurilate modelas ! Aŭdu ankoraŭ unu ekzemplon :

A.- *Arda optimismo, kvazaŭ la luno trafadenanta sian arĝenton en lagsinon, trakernas la tutan kolekton. En la haladzo de la sepsa pesimismo, pli kaj pli ŝvelpusa en nia epoko, tiu spirhelpa ozono kaj subretita humanisma vidpunkto donas aparte valoran trajton al la antologio.*

Cl.- Eble personoj ŝatas tiun komplikecon. Mi eble surdas al la vortmelodio. Sed tro da vortoj ne plu parolas almenaŭ al mia cerbo kaj al la cerbo de la plej granda parto de la legantoj de tiu posedenda novelaro.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-